# LA TAŬRA VOĈO

Kongresa Kuriero de la 108a Universala Kongreso

Ĵaŭdon, la 3an de Aŭgusto 2023 Numero 5


## Salutvortoj por UK en Torino de s-ro Christopher Wagner

### Urbestro de Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo

Karaj amikinoj kaj amikoj de la lingvo Esperanto,
kiel urbestro de la bela urbo Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo mi ĝojas, ke la lingvo Esperanto estas daŭre disvastigata kaj ke parolata en multaj landoj.
Esperanto elstaras pro la universala kaj popolkunliganta komunikado.
Pro tio mi esperas, ke vi ĉiuj travivos sukcesan kaj gajnportantan kongreson en Torino.
Kun la plej bonaj deziroj mi kore salutas vin el la Esperanto-urbo Herzberg am Harz
via Christopher Wagner
Bürgermeister / urbestro
buergermeister@herzberg.de
p.s.
Same kore salutas kunlaborantoj de la urbo s-ino Schirmer, s-oino Kiep, s-ro Weippert kaj s-ro Päckers.

## Salutparolado de Jaume Domènech

### Urbestro de Subirats




Por aŭskulti la tutan paroladeton oni povas konektiĝi al Jutubo ĉe ĉi tiu retadreso:
https://www.youtube.com/watch?v=D2TmKAgCc2w

## Ĉukpilka leciono

La 3an de aŭgusto, ĵaŭdon, ĉe la kongresa sportejo en Corso Ferrucci 63, de la horo 17a okazos la programero: "Lernu ludi ĉukpilkon en 1 horo!"

## Saluto de la veteranoj

Karaj gekongresanoj,
Vi venis el ĉiuj geografiaj horizontoj por praktike atesti la historian celon de Esperanto kaj por kontribui al la interkompreniĝo kaj alproksimiĝo de la popoloj sur la terglobo. Kiel diris Zamenhof, ĉi tie hodiaŭ ne kunvenas divers-etnaj kaj diversreligiaj personoj, sed nur "homoj kun homoj por frate premi al si reciproke la manojn"
Ni ne estas solaj hodiaŭ, ĉar neaŭdeblaj misteraj voĉoj aldoniĝas al la niaj. Estas la voĉoj de miloj da veteranoj, kiuj antaŭ ni, ek de la plej fruaj tempoj, dediĉis ĉiujn tagojn de sia vivo, ĝis la morto, al la progresigo de nia supernacia lingvo por la bono de la homaro.
Pere de mi, ili, la veteranoj, tutkore bonvenigas vin en la dumiljara Torino.

*Gian Carlo Fighiera, veterano*

## Futbala matĉo je la 17.00

Hodiaŭ je la 17an okazos la futbala matĉo Inter la teamoj esperantista kaj de peruaj enmigrintoj. Ne maltrafu la okazon subteni ambaŭ la teamoj (sed la kongresan teamon vi rajtas subteni iom pli). La kuraĝuloj ludos en Corso Ferrucci 63 (supreniru la stuparon por atingi la sid-lokojn).
Por la okazo ni ankaŭ klopodos aranĝi mallongan koncerton de Kim !!!

## ANONCOJ

### Piemontaj vinoj aĉeteblaj



Bongustaj Piemontaj vinoj aĉeteblas en la kongresejo.Ĉu vi cerbumas pri taŭga, regiona kaj eĉ bongusta donaco de la kongreso kaj Italio? Aŭ eble simple volus mem gustumi ion regionan? Tiukaze ni varme rekomendas provi la piemontajn vinojn, rekte de la loka produktanto. La vinoj troveblas en la vendobudo, dekstre de la Tanzanio-budo kaj maldekstre antaŭ la libroservo. Haveblas 5 tipoj (2 blankaj, 3 ruĝaj), ĉiu el ili po 6 EUR/ botelo. La enspezo de la vendo iros al la Fondaĵo Afriko, por organizado de la ontjara UK en Tanzanio. (En la sama budo aĉeteblas ankaŭ kelkaj tipoj de T-ĉemizoj kaj lastatempaj libroj de EAB, ĉefe belegaj fabellibroj).

## KOMUNIKOJ

### Naturistoj disvastigas Esperanton dum ekskurso!

Kiel kutime, INOE organizis ekskurson dum la ekskursotago de la UK. Tiun jaron, ni vizitis naturisman centron "Le Betulle" (la betuloj), kiu situas 22 km for de la kongresejo. Ni povis ĝui la lokon: naĝi nudaj en ĝia naĝbaseno, komune pikniki sub arboj, promeni sur la tereno aŭ interŝanĝi inter ni pri diverslingvaj amuzaj diferencoj aŭ anekdotoj. Ni ankaŭ renkontis la naturistajn loĝantojn kaj feriantojn kaj ni prelegis plurvoĉe kaj plurlingve (angle, itale, germane kaj france) pri esperanto antaŭ 14 neesperantistoj, kies intereso estis vekita de dulingvaj afiŝoj antaŭpreparitaj de niaj akceptintoj. Ni ankaŭ disdonis kartetojn itallingvajn pri la nuna UK kaj pri Esperanto.
Pli da informo: https://www.esperanto-naturismo.org/post/2023-08-02-eksurso-dum-la-uk
Pri « La Betulle »: Kun areo de 14 hektaroj mergita en la naturo de Val Ceronda, "Le Betulle" estas ideala celloko por familia ferio, mallonga restado aŭ ekskurso dediĉita al malstreĉiĝo kaj naturista amikeco.

### Ĉiutagaj aktualaj retaj elsendoj de la 108-a UK

Aŭskultu regulajn sonraportojn el Torino, farataj de la dukapa teamo de la Pola Retradio, sub la gvido de Barbara Pietrzak. Ĉiutage ili prezentas al la aŭskultantoj la freŝajn novaĵojn de la evento. Ĉio pri la UK (kaj multo pli, ĉar ilia arkivo ja estas vere riĉa kaj nepre esplorinda) vi trovos je la adreso: https://pola-retradio.org/

### La oficialaj ĉemizoj de la Kongreso

**Vendataj ĉe la Libroservo**








## Raporto pri la Science Programo

Dum la unuaj tri tagoj de la UK jam realiĝis pli ol duono de la abunda sesio de la Internacia Kongresa Universitato. El naŭ IKU-prelefoj kaj 10 prelegoj de la science Kafejo (SK) jam okazis 6 IKU kaj 5 SK. Ĉiuj prelegoj okazis hibride kaj estis registritaj.
En la IKU-inaŭguro dimanĉe, la IKU-rektoro Fabrizio Pennacchietti invitis la prelegantojn fari unu-minutajn reklamojn de siaj prelegoj kaj la IKU-kunordiganto kaj prezidanto de AIS Amri Wandel faris koncizan historian skizon de IKU kaj Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS). Sekvis la du unuaj IKU-AIS prelegoj, pri Qvantuma Interplekteco (Jacobsen) kaj la Kikonga lingvo (Goes).
Lunde okazis la du sekvaj prelegoj: pri Lingva pejzaĝo (Labrie) kaj Ekstertera vivo (Wandel). IKU 5 kaj 6 okazis marde, pri Boulton (Tonkin) kaj Academia Interlingua en Torino (Barandovska-Frank). En la prelegoj partoprenis surloke 50-100 aŭskultantoj kaj per Zoom 5-20. Estis vigla demando-sesio kaj foje venis demandoj per Zoom. Marde matene okazis la unua sesio de la Scienca Kafejo, kun 5 prelegoj po duonhoro, pri tre variaj temoj (robotoj, gemoj, neŭropedagogio, Ramstedt, kaj la arkivoj de UEA en Vieno).
Marde vespere okazis la Faka Forumo, ankaŭ hibride, dum kiu prezentis sin 15 Fakaj Asocioj.
Ĵaŭde matene okazos la dua sesio de Scienca Kafejo kun 5 pliaj prelegoj, sekve IKU7 pri la (ne)reguleo de lingvoj (Goodall) kaj ĵaŭde posttagmeze - la daŭrigaj prelegoj de la tri unuaj IKU-AIS-prelegoj, AIS1-2, AIS2-2 kaj AIS3-2.
Vendrede okazos la du lastaj IKU prelegoj, pri Hidrogena Ekonomio (So) kaj La DNA de Esperanto (Pennacchietti). Fine okazos vendrede la Scienca Forumo en kiu pni resumos la tutan IKU-sesion, disdonos AIS-atestilojn al la ekzamenitoj en la IKU-AIS kursoj (ekzamenetoj okazos ĵaŭde fine de AIS1-2), anoncos la gajnintojn en la Premio Pirlot por la plej bona scienca libro, kaj diskutos pri la estontecon de la science agado en Esperantujo, aparte pri ISAE.
Se vi ne jam havas la IKU-libron 2023, indas ĝin aĉeti antaŭ ĝi elĉerpigcos. Kun 241 paĝoj, 19 altnivelaj tekstoj de ĉiuj prelegoj, 3-lingvaj resumoj kaj multaj ilustraĵoj ĝi estas la kulmino de science E-eldonado. Nur 20 Euro en la Libroservo kaj ĉe la IKU-prelegoj.

*Amri Wandel – UEA-vicprezidanto*

## Torino urbo de Don Bosko

Torino estas ankaŭ konata tra la mondo kiel urbo al kiu estas forte ligita nomo de Don Bosko (1815-1888), kiu en la kvartalo Valdocco prizorgis stratinfanojn. Okaze de la 108-a UK, sed same okaze de la 135 datreveno de lia morto, Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista organizis la 2-an de aŭgusto la "Pilgrimon al Don Bosko". Signife numbra grupo kolektiĝis antaŭ la baziliko de Maria Helpantino. La meson kuncelebris tri ĉeestas katolikaj pastroj, saleziano Hatto von Hatzfeld, benediktano Gustavo Zanolli kaj dominikano Benoit Ente. La partoprenantoj de la pilgrimado ĝoje kunlantis. Premiere estis kantita kanto honore de Don Bosko kreita dum la lastaj tagoj de Albrecht Kronenberger. Sekvis vizito kun la faka gvidado al la lokoj kie vivis kaj agis Don Bosko. Aparte kortuŝa estis vizito al la ĉambro de Don Bosko, kie li fondis la kongregacion de salezianoj, sed same kie li mortis. Sekvis la bongusta tagmanĝo. La programo finis per la vizito al la Muzeo dediĉita al la mondfama Torina tolaĵo. Gravas mencii, ke ĉi pilgrimadon partoprenis pluraj kongresanoj, ne membroj de IKUE, pro kio aparte ĝojas IKUE, ĉar post la pilgrimado al Fatimo (dum la Lisbona UK), denove sukcesis kapti la atenton de la kongresanoj ĝenerale. Ĉiuj kiuj interesiĝas pri IKUE, bv. skribi al: ikue.reto@gmail.com.

*Marija Belošević, kn 117*

## Ekskurso al Lago Maggiore

Ekskurso al la lago Maggiore okazis informplena, ĝua kaj ĝoja.
Ĉiĉeronoj Pier Luiĝi kaj Fabrizio respondece kaj gaje gvidis kaj paŝtis multnombran E-gregon al triinsula plezuro. La ekskurso estis informplena kaj humura ne evitanta kelkajn kuriozaĵojn. La insulo Bella estis vere bela kaj informplena kun sia Princa palaco riĉa je unikaj antikvaj artaĵoj. La dua fiŝkaptista insulo ege estis alloga ankaŭ per atendo de promesita freŝkaptita fiŝo por nia tagmanĝo. E-flago raris tie kaj vokis demandojn pri Esperanto kiuj tuj estis responditaj emocie. La restoracio situis en tri diversnivelaj terasoj kaj belis per la pejzaĝo al la lago. Kiel kutime, por la tagmanĝo ni ricevis dekomence verdan salaton, poste paston kaj poste...deserton kiujn ni tuj rifuzis pro atendo de la fiŝa plado. Sed okazis ke ni jam formanĝis ĝin! La servistoj klarigis ke dispecigita fiŝo, ĝi estis kaŝita ene de la pastaĵoj kaj ni tion ne rimarkis eĉ. Ni devis kredi ke ni tamen manĝis fiŝon. La tria insulo Madre, laŭ mi, estis plej impona, interesa, romantika kaj ĝuinda. Fakte ĝi estas unika botanika ĝardeno kun multaj buntkoloraj birdoj kaj bela palaco centre. Dankon pro bela ekskurso kaj profesia perfektlingva gvidado!

*Eŭheno Kovtonjuk KN 127*

# PROGRAMO

## Afrikaj budo, kunveno

Ankoraŭ ĉi-jare la tradicia afrika kunveno dum UK okazis hibride en la salono Fighiera-Sikorskala, la 1-an de aŭgusto. Partoprenis la kunvenon ĉeeste trideko da kongresanoj kaj ankaŭ homojdefore. Dum pli ol horo estis jen vicaj atestoj far geamikoj de Afriko subtenantaj projektoj en la kontinento, jen salutvortoj al la kunveno. Citindas tiu de s-ino Eva Kaluwa, reprezentantino de la tanzania diplomatia domo en Italio. La kunveno grandparte kaj esceptkaze enfokusiĝis pri la Aruŝa UK en 2024. John E. Magessa kaj Costantine Mashauri respektive sekretario kaj prezidanto de la Loka Kongresa Komitato (LKK) aparte anoncis la kolorojn de la venontjara evento en a kontinento. Ili per lumbildoj faris prezentojn pri sia hejmlando Tanzanio, la lando de la 109-a UK. Iliaj prezentoj kaptis atenton de pli ol unu persono en la salono.
Tiu sukceso de la reta elsendo estas plena merito de Francesco Maurelli. Kvankam la ideo pri hibrida kunveno leviĝis lastminute, li helpis aranĝi kaj persone okupiĝi pri la teknika aspekto. Tiel dank' al li homoj, kiuj pro iuj kialoj kaj aliaj ne povis fari vojaĝon al Torino, povis defore spekti la kunvenon.
Ĉi-vendredre, inter la 17-a kaj 18-a horoj en la salono Lapenna, okazos oficiala prezento pri venontaj UK. Ni kore petas al vi bonvolu helpi diskonigi la anoncon, inviti viajn gekonatojn kaj plejgrave mem veni kaj partopreni tiun oficialan prezenton. Temos pri aferoj, kiuj certe interesos vin, ĉar vi rekte de la buŝo de tanzanianoj lernos pri la venontjara prestiĝa renkontiĝo en Esperantujo.
Dume, ni kore bonvenigas vin – ĉu kiel scivolemulojn pri afrika agado, ĉu kiel eblajn partoprenantojn de la unua afrika UK, ĉu simple kiel esperantistojn – ĉe la afrika budo en la akceptejo. Tie estas montrataj memoraĵoj por donaco… T-ĉemizoj, notkajeroj, ĉapeloj, flugofolioj pri la sekva UK kaj multaj aliaj interesaĵoj kun la emblemo de la 109-a UK. Via vizito al la afrika tablo estos konsiderata kiel simbola rekono kaj subteno pri la movado en Afriko. Certe via vizito al la afrika tablo donos al vi utilon kaj plezuron. Venu mem vidi!

*Adjé Adjévi KN 1091*

# PROGRAMŜANĜOJ

## Aktualigoj de la ĵaŭda programo

### Nuligita programero

Tokipono: La lingvo de bono
Ĵaŭdo, 16:15-17:00, Canuto

### Aldonitaj programeroj

Aŭtora duonhoro 15: Laure Patas d'Illiers
Renkontiĝo kun la aŭtorino Laure Patas d'Illiers de "Sur bluaj planedoj" - sciencfikcia novelaro originale verkita en esperanto, kiu estas vendata de la libroservo de UEA.
Prezento de la libro, kun eblo subskribi la verkon.
Ĵaŭdo, 11:00, Pettyn

Aŭtora duonhoro 14: Mikaelo Bronŝtejn
Ĉi-foje mi prezentos miajn poemojn, inkluzive de la lasta mia poemaro "Mi vivas en la mondo malperfekta",
Ĵaŭdo, 9:00-9:30, Pettyn

Eklezioj kaj Esperanto
Mikaelo Bronŝtejn invitas vin al fascina prelego, per kiu li celas prezenti rilaton de mondaj eklezioj al la internacia lingvo, koncentriĝante ĉe la trovitaj de li kaj nekonataj por la esperantistaro dokumentoj pri la rusaj eklezioj kaj Esperanto.
Ĵaŭdo, 16:15-17:00, Canuto

## Raporto pri la kunveno pri Eŭropo

La kunveno okazis en la salono Fighiera-Sigorska. Ĉeestis proksimume 40 kongresanoj grandparte el eŭropaj landoj. Enkondukis la diskutojn Renato Corsetti, Aurora Bute kaj Pierre Dieumegard, respektive estraranino de UEA, kunordiganto de la Eŭropa Komisiono kaj prezidanto de Eŭropo Demokratio Esperanto. Oni raportis pri la provoj influi Eŭropan Union pri Esperanto kaj pri la malfacilaĵo esti aŭdata. Tamen oni instigas eŭropajn esperantistojn daŭre kontakti siajn eŭropajn parlamentanojn por peti, ke EU starigu oficejon por kontroli la evoluon de multlingvismo en Eŭropo. Samtempe oni parolis pri la bezono de agadoj tra la civitanoj, simple por konvinki ilin lerni Esperanton. Tion, kion ni vere bezonas en Eŭropo estas amaseto da komencantaj esperantistoj, kiuj kunlaboru kun la Esperanto-movado. La aplikado de Esperanto [literaturo, turismo, ktp.] sekvos aŭtomate kaj sen problemoj.

*Renato Corsetti KN 22*

## Koncerto de ĵomart kaj Nataŝa

La koncerto de ĵomart kaj Nataŝa, la 01-an de aŭgusto estis la plej plena ĝis nun en salono Lapenna. La publiko kaj la artistoj sopiris denove tiun renkontiĝon, kiu estis tre emocia por ambaŭ.

*Rogener Pavinski KN 1100*